

La Voĉo de la 1^a Kongreso

Eldono okaze de la 27a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — NANCIO — 31 Julio — 6 aŭgusto 1954

RENKONTEN AL NANCIO!

La lastan fojon mi kunlaboris al la „Voĉo“ en ĝia 7-a numero, kiu aperis okaze de la Torina SAT-Kongreso, la 23-a, en Julio—Aŭgusto 1950.

En tiu artikolo mi reliefigis kelkajn el la avantaĝoj, kiujn donas vizito de SAT-Kongreso al ĝiaj partoprenantoj, membroj de nia Asocio aŭ ne. Pasis intertempe kvar kongresoj: tiu Torina kun sia suda varmeĝo kaj koloreco, la Stokholma kun siaj brilaj aranĝoj en la „norda Venecio“ (Skansen, arkipelago), la Duseldorfa en la impona kongresejo apud la Rejno, la Ŝefilda en la romantika feŭda kastelo apartenanta nun al la Laborista Movado.

Certe, se ni filmilde rememoras ĉi tiujn kulminajn okazaĵojn el la SAT-vivo, ni pensas unue pri la kolorbildo de la pejzaĝo, de la kongresa urbo, de la kongresejo mem, — ĉiam impona, preskaŭ pompa kunvenejo: en Torino la Madam-palaco, en Stokholmo la Civitana Domo, en Duseldorfo la Rejnhalo, en Ŝefildo la kastelo de Wortley Hall, — kaj pri iuj ekskursaj bildoj neforgeseblaj: ŝipveturoj, aŭtobusaj vizitoj al montoj kaj antikvaj kultur-restaĵoj, ktp.

Ne malgrandigante la kulturalan valoron de tiuj aranĝoj, ni venu al la kerno de niaj kongresoj, al tio, kio plene gravas por la evoluo de nia SAT-movado, tio estas la propradira kongresa laboro: la kongresaj laborkunsidoj, centraj kaj fakaj, kaj ĝiaj kulturaj prelegoj pri plej ofte tre gravaj kaj aktualaj temoj.

Pli kaj pli disvolviĝis tiu lasta parto: rekordan nombron da prelegoj ni povis registri en Duseldorfo kaj ankaŭ en Ŝefildo. Tre ĝojiga konstato! Ja estas nepre dezirinde, ke la kongresanoj kunprenu hejmen impresojn kaj sciaĵojn pri valoraj paroloj, pensinstigaj debatoj, dokumentplenaj informoj, anstataŭ reveni kun konfuza memoro pri diskutitaj raport-fragmentoj, organizaj demandoj ofte pure administraciaj kaj sekve elsekigantaj la vivplanan kongresan atmosferon de homoj, kamaradoj, kiuj intervidiĝas unu fojon jare nur por interŝanĝi amikajn parolojn sur la serioza fono de SAT-Kon-

greso kun socipolitika tasko kaj kun la ĉiam ripetiganta admono: „Uzante unu komunan lingvon, vi solvas plej glate ĉiujn problemojn, ankaŭ la sociajn“.

Tio ne signifas, ke ni devas neglekti nian organizan laboron: Ni devas kiel eble plej bone ebenigi la funkciadon de la SAT-aparato, ĉar se ĝi glate kaj sen-malhelpa funkcias, ni povas registri multe pli da palpeblaj sukcesoj, da pozitivaj atingoj ol se ni trenas post ni nekoordinitajn aparaterojn kvazaŭ bremsantan ĉenon. La SAT-funkciuloj precipe la Landaj Perantoj, prenis sur sin ja gravan respondecon pri la funkciado de la SAT-a mekanismo. Ili estas la pivotoj, ĉirkaŭ kiuj turniĝas la radoj de la Asocio.

Sed ni devas dediĉi, en niaj Kongresoj, la minimuman tempon al la administraciaj problemoj kaj konsenti maksimumon al la pure kulturaj taskoj: la prelegoj kaj debatoj, la inform-vesperoj (kiel tiu en Wortley Hall pri laborista movado en Britio).

Nancio signifas sendube novan paŝon al plifortigo de nia Asocio laŭ eksteraj mezuroj kiel laŭ sia interna esenco kaj enhavo. Nancio promesas kunvenigi grandan anaron venont-aŭguste en siaj muroj. Ĝia Organiza Kongres-Komitato povas sin apogi sur la spertoj de la antaŭuloj, kaj ni rekonu, ke ĉiu el la postmilitaj SAT-kongresoj alportis novan valoran sperton, novajn formulojn kaj sugestojn; kaj kiuj regule vizitas SAT-kongresojn, ili kun plaĉo konstatis la kreskantan harmoniecon en la kongresaj programoj. Kiu venos por la unua fojo al SAT-Kongreso, okaze de la 27-a en Nancio, ili fidu al la sperta organizado de la Nancia O. K. K. Sed aliflanke ili ankaŭ ne forgesu, ke ĉiu unuopa kongresano kontribuas per sia humoro, per sia aktiveco, per sia komprenema kaj tolerema sinteno al la sukceso de la tuta aranĝo.

Pri tio vi ĉiuj estu konsciaj: venante multnombraj kaj partoprenante en plena aktiveco al la Kongreso, vi servas nian komunan aferon, vi akcelas la prosperon de SAT kaj igas triumfi niajn ideojn.

N. BARTELMES



Ĉe la oraj pordegoj

de nord-orienta Francio troviĝas la vojaĝo-celo, la rendevuejo de la S. A. T-anaro en 1954. En la kadro de la nancia Koncerta Domo, nia loka S. A. T. Rondeto kun ĝojo akceptas vin kaj provas doni al nia 27-a Kongreso maksimuman amplekson.

Por vi, kiuj kutimas viziti niajn Kongresojn kaj alte taksas la klerigan flankon de niaj jaraj kunsidoj, ni organizas Laboristan Universitaton kun prelegoj de diverslandaj kompetentaj Kamaradoj. Vi vizitos fabrikojn, laborejojn, kaj povos proprokule studi la vivkondiĉojn.

Malgraŭ la politika disiĝo de la laboristaj fortoj en Francio, ni aranĝis kontaktojn por vi kun laboristaj organizoj. Ni ankaŭ rilatis kun la oficialaj urbaj instancoj — konservativemaj; tiuj tamen decidis konsiderinte la valoron de nia per-esperanta laboro, apogi nin per tre konkretaj oferoj. Vi estos bonvenigataj oficiale en la Urbodomo de Nancio kaj fratece akceptataj de la laboristaj Respondeculoj en najbara urbeto, centro de la lorena fer-baseno.

Sed, vi mem kreas la sferon de nia 27-a, vi kontribuos al ĝia sukceso kunportante al Nancio vian bonhumoron aŭ artkapablon por la distraj partoj de la semajna programo kaj vian parolkapablecon aŭ studemon dum la klerigaj kunsidoj.

Ni deziras al vi bonan vojaĝon al nia ĉi-jara renkontiĝo

ĝis revide en Nancio!

O. K. K.

Iom da historio pri Loreno kaj Nancio

Kiam J. Cezaro konkeris Gaŭlion, la regiono de la supraj valoj de „Moso“ (Meuse) kaj „Moselo“ (Moselle) estis okupitaj de du keltaj gentoj kies ĉefurbo estis Tullum (Toul) kaj Divodurum (Metz). Ŝirmitaj per la romia defendo instalita apud la Rejno, ambaŭ gentoj travivis brilan epokon. La romanaj Legioj trovis tie provizumajojn kaj etap-loĝejoj. Sur la kamparo starigis domoj laŭ „latina vilao“, kaj el ĉiuj direktoj ili konstruis taŭgajn vojojn. Fine la tuta regiono prosperis dum tri jarcentoj en relativa paco.

Post la romia dekadenco la invadintoj komencis akumuli ruinojn. La plej teruraj estis la Hunoj sub la gvido de Atilo (Attila) en 451. En la kvina jarcento, Klodvigo (Chlodovech, france: Clovis), reĝo de la Frankoj entreprenis konkeron de Gaŭlio. Post la morto de Klodvigo (511), la orienta parto de la reĝlando kies ĉefurbo estis Remo (Reims) fariĝis la lotaĵo de lia plej aĝa filo sed la tuta franka lando estis denove kunigita sub la reĝo de Clotaire la unua. Je la sepa jarcento tiu orienta parto nomiĝis „Austrasie“.

Kiam Pipino la malgranda anstataŭis la kadukajn Merovingiojn en 751, la mosela regiono konis la plej brilan periodon de sia historio. La reĝa palaco en Thionville estis la preferata rezidloko de la Karolingioj.

Poste, la nepoj de Karlo la granda (filo de Pipino) partigis inter si la imperion en Verduno (843). La plej aĝulo Lothar, elektis la „Francia-median“ longan strion da teritorioj etendiĝantaj de Romo ĝis la norda maro. Kiam li mortis (855) liaj tri filoj denove partigis inter si tiun heredajon. Lothar la dua ricevis la landon, kiun oni tiam nomis: Austrasie. Tiun landon oni poste nomis „Lotharii regnum“ (reĝlando de Lothar) nomo kiu en la romida lingvo iĝis „Lotherrègne“, Lorraine. (Loreno)

Fakte la duklando nur portis tiun nomon, sed por la najbaraj popoloj, ĝi restis kunligita kun la tuta regiono. Cetere la loĝantoj mem konsciis pri komunaj tradicioj.

La lorenaj Duko, kiuj posedis bienojn apud la Meurthe-rivero, estis ŝirmitaj per iu „castrum“, fortikigita vilaĝo, kiu nomiĝis Nancy (Nancio). Ek de la 12a jarcento la lorenaj dukoj elektis tiun lokon kiel restadejon. La duko Renato la dua devis defendi sian urbon kontraŭ la fama Karlo la bravegulo en januaro 1477, kaj verkis tiam memorindan paĝon de tiu epoko. Tiam staris la „malnova urbo“ kun mallarĝaj stratoj, domoj malrekte kaj hazarde konstruitaj ĉirkaŭ la kastelo de la lorenaj dukoj. Lia filo, duko Antonio, komencis beligi la urbon. Post li, Karlo la tria, de 1587 ĝis 1608 konstruigis la „novan urbon“, laŭ moderna koncepto kun rektaj stratoj, tiu nomiĝis: Nancio la bela.

Post la malgajaj tempoj kaj profundeaj mizeroj de la 17-a jarcento, la urbo brile renaskiĝis sub la regno de Leopoldo (1697—1729), la lasta laŭtipa lorena duko. Postrestas ankoraŭ hodiaŭ ĉirkaŭ la placo „de la Carrière“ kaj en strato „du Haut Bourgeois“, belaj nobeldomoj laŭ klasika stilo. De tiam la vivo en la urbo pli kaj pli agrablis.

Stanislas Leszczynski, (bopatro de la franca reĝo Ludoviko la 15-a) eksreĝo de Polio, venis en 1737. Por ke la popolo bone akceptu lin, li arte kaj malavare plibeligis la lorenajn urbojn, precipe Nancion. Inter la malnova urbo de la dukoj kaj la „nova urbo“ de Karlo la 3-a, li konstruigis trian urbon: la modernan Nancion. Li ĝin dotis per tiu monumenta beleco, pri kiu oni ne laciĝas admiri la harmonion de la linioj kaj la ekstreman elegantecon de la proporcioj. Li donis al ĝi la juvelon, kiu nun portas lian nomon, kaj kiu donigis al Nancio la titolon: la urbo kun oraj pordoj.

Post la malapero de la fortikaĵoj, iu ĉirkaŭmuro longtempe konservis la fizionomion, kiu nete indikis la planon de la urbo. La intensa industria vivo kiu regis en la dua parto de la 19-a jarcento ne plu povis rezisti inter tiu ŝtonbarilo. Precipe en tiu epoko, la nova Nancio kreiĝis. Oni ankoraŭ ho-

diaŭ bone rekonas la „malnovan“, la „novan“, la „modernan“ urbojn kaj la novan Nancion. Belarta urbo, intelekta kaj scienca fokuso, Nancio entenas la aktivecon plej modernan kaj intencan kun la plaj eleganta kaj harmonia ornamo. Ĝia nuntempo kaj ĝia pasinteco rezultigis veran ĉefurbon, unikan urbon en la mondo.

En Nancio naskiĝis kaj vivis famaj skulptistoj kiel F. kaj N. Drouin, Cezar Bagard, Sigisbert Adam, Clodion; la pentristoj C. Gelee kaj Isabey; la gravuristoj C. Héré kaj Jean Lamour (verkinto kaj kreinto de la famaj ferornamaĵoj); la literaturistoj Saint Lambert, Graffigny, Guilbert de Pixérécourt; la historiisto d'Arbois de Jubainville; la patro de Victor Hugo, k. m. a. Laŭ arta vidpunkto, Nancio estas unu el la kvin francaj urboj je tutmonda renomo. Ĝi sendube ŝuldas tion al sia historia rolo, al sia influo kiel centro de intensa literatura movado samkiel al siaj industria kaj komerca aktivecoj sed ĝi tion ankaŭ ŝuldas al la novaj konceptoj alportitaj de ĉiaspecaj artistoj. En la meblo-fako, la fama artisto Majorelle fondis skolon en 1858, kiu kreis novan stilon. Dum 60 jaroj, tiu artisto faris verkojn kiuj ne plu parencis kun la stiloj „Ludoviko 15-a aŭ 16-c“. La „moderna stilo“ (1925) bremsis tiun arton sed Louis Majorelle postlasis verajn ĉefverkojn.

La nanciaj muzeoj havas tre allogan aspekton. La „Lorena Muzeo“ instalita en la malnova „Duka Palaco“ entenas rarajn kolektojn, historiajn memorajojn en belega kadro. La urba muzeo de l'belartoj kun siaj malnovaj kaj modernaj verkoj, la muzeo pri geologio, la botanika ĝardeno, vere meritas viziton de la turistoj.

Hodiaŭ la urbo enhavas 125.000 loĝantojn, ĝi senĉese plivastiĝas. En Nancio troviĝas kompleta Universitato: Juro, beleto, sciencoj, medicino, farmacio. Estas ankaŭ Altlernejoj pri minoj, ĥemio, elektro-mekaniko, agromonio, komerco, muzika konservatorio. La publika biblioteko entenas 400.000 volumojn kaj 3.000 lorenajn manuskriptojn.

Ni vere rajtas esperi, ke la SAT-anoj multnombre volos partopreni la 27an Kongreson por ĝui belan restadon en la lorena ĉefurbo kaj samtempe viziti kaj ripozi en la ravaj ĉirkaŭaĵoj.

MARSO

UNUE EKKONU VIN MEM!


Kiom helpas nun al vi,
se parkere scias
vi enhavon de l' Bibli',
se vi teorias
pri scienca mondproblem',
se vi eĉ disponas
multan scion, sed »Vin Mem«
tute vi ne konas?

Se ripetas daŭre vi
iun katehismon,
se vi studas kun pasi'
ade ĉiun — ismon,
ĉio estas sen valor',
se vi nur abstrakte
vivas, se vi ne en kar'
konas »Vin« ekzakte!

Se person' ne konas sin, ĝi fariĝas nulo,
aŭ inverse pro doktrin' fanatikemulo.
Tial studu ĉefe vin, ĉu vi »Homo« estas,
kies indon sen rutin' propra viv' atestas!

JOSEF BURGER

La malnova duka palaco (Historia Muzeo)





Provizora programo

SABATE — 31^a de Julio:

9,00 h: Malfermo de la Akceptejo.
20,30 h: Interfratiga Vespero en galerioj de la Kongresejo. Apartaj tabloj. Programo kun kontribuoj de la ĉeestantoj.

DIMANCE — 1^a de Aŭgusto:

9,00 h: Malferma, unua Kunsido. Salut-paroladoj. Elekto de la Prezidantaro.
11,00 h: Akcepto en la Urbodomo. Kongres-fotado.
14,30 h: Vizito gvidata de la urbo. Publika Koncerto en la urba ĝardeno.
20,30 h: Kultura Vespero — Spektaklo kun partopreno de artistoj el teatro, muzik-konservatorio kaj folkloro grupo de Nancio.

LUNDE — 2^a:

9,00 h: Unua laborkunsido.
14,30 h: Fak. kaj Frakci-kunsidoj. Vizitoj al fabrikoj kaj Muzeoj.
20,30 h: Malfermo de la Laborista Universitato. Prelegoj.

MARDE — 3^a:

9,00 h: Dua laborkunsido.
14,00 h: Duontaga Ekskurso — Mosel valo — Akcepto de la partoprenantoj en »Neuves Maisons«, urbeto, centro de la lorena fer-baseno kies laborista urbestro invitis la Kongreson.
21,00 h: Laborista Universitato — unu Prelego.

MERKREDE — 4^a:

9,00 h: Tria — lasta laborkunsido.
11,00 h: Laborista Universitato — unu Prelego.
14,00 h: Vizitoj al fabrikoj kaj Muzeoj. Fak-Frakci-kunsidoj.
20,00 h: Laborista Universitato: (Kontribuo de SAT Junularo).

ĴAŬDE — 5^a:

7,00 h: Tut-taga Ekskurso al »VOGEZOJ—ELZACO«.

VENDREDE — 6^a:

9,00 h: Laborista Universitato — unu Prelego.
10,00 h: Fak-Frakci-kunsidoj.
14,00 h: Fermo de Laborista Universitato — Debato.
20,00 h: Gaja Vespero — Orkestro — programo kun kontribuoj de la Kongresantoj el Germanio, Jugoslavio, Francio, ktp.
23—24 h: Adiaŭoj.

SABATE

matene, foriro de la partoprenantoj al POST-KONGRESAJ ARANĜOJ.

— — — Ĉiutage, 11,45 h. — parolata tag-gazeto kaj komunikoj de O. K. K.

LABORISTA UNIVERSITATO: Spertaj Kongresantoj prelegos pri aktualaj problemoj interesantaj ĉiujn laboristojn. La celo de Lab. Universitato estas nur kleriga. Parolkapablaj S. A. T. Gejunuloj ankaŭ alportos kontribuon dum tiuj kunsidoj.

EKSKURSOJ: La Duon-taga celas — doni al vi impreson pri la »vizaĝo« de Loreno, ĝiaj vilaĝetoj kaj industriaj centroj — respondi al invito de najbara laborista Komunumo. La Tut-taga, trans tuta vojeza montaro kondukos vin ĝis la tre pitoreska »Elzaco«.

VIZITOJ: Tiu parto de nia programo celas montri al vi du Muzeojn kiuj havas ne ordinarajn karakterojn, t. e.: Lorena Muzeo kaj Muzeo de la Tero. Dum la vizitoj en diversaj fabrikoj, vi povos propraokule pristudi kaj kompari la laborkondiĉojn.

KONGRESONTOJ

ORGANIZA KONGRESA KOMITATO
KOMUNIKAS
KONSILOJN kaj INFORMOJN

Mon-ŝanĝo: Tiu problemo estas solvebla per aĉeto de franca mono antaŭ via vojaĝo preferinde. Al Kongresantoj kiuj atingos Nancion kun landa mono aŭ Bankĉekoj, ni rekomendas tuj okupiĝi pri ŝanĝo ek de via alveno. Ĉiuj ĉefaj Bankoj havas sidejojn en Nancio je kelkaj paŝoj de nia Kongresejo. O. K. K. klopodos por ke ŝanĝ-giĉetoj estu malfermataj en oportuna tempo por la Kongresantoj.

Provizora Karto: Bonvolu ne forgesi kunporti al Nancio.

Rabatoj por francaj fervojoj: Kongresantoj kiuj utiligas tiujn rabatojn, bonvolu nepre kunporti ilin al Nancio. Ili devas esti stampitaj en la nancia Stacidomo.

Loĝado: en Hoteloj — Kongresanto mem pagos al hotel-estro. Oni ne forgesu eventuale dekalkuli la antaŭpagon por rezervigo. La adreson de via Hotelo vi trovos en via »Kongresa Dokumentaro«.

La diversaj Amasloĝejoj ricevos esperantajn nomojn: Universo, Estonto, Espero, ktp., por simpligi la preparan laboron. La adreso de via Amasloĝejo troviĝos ankaŭ en kongres-dokumentaro kaj la kongresa adresaro aperos en dua numero de »Voĉo« kiun vi ricevos en Nancio. En amasloĝejo A, la ĉambroj estas atingeblaj per liftoj, la komforto tre granda. En B. la aranĝo estos tre simpla. Tiuj instalaĵoj estas specialaj por la Kongreso, do tute provizoraj (kamplitetoj kun kovriloj). La diversaj loĝejoj estos tre facile atingeblaj de la Kongresejo, piede kaj aŭtobuse.

Manĝo: Se vi mem decidis elekti, vi trovos liston de rekomenditaj Restoracioj kun prezoj en dua N^o de »Voĉo« kaj Dokumentaro. Se vi rezervigis lokojn en Kongresa Restoracio, vi ricevos kuponon en via Dokumentaro. Tiuj kuponoj estas nek repageblaj nek ŝanĝeblaj pro neutiligado aŭ perdo. Maten-manĝetojn mem zorgos ĉiuj Kongresantoj en unu el la multnombraj kaf-trinkejoj de la urbo.

Kongresa Bufedo: Varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj estos akireblaj en la Kongresejo dum la tuta semajno.

EKSPOZICIO: En la Galerioj de nia Kongresejo. Ĝi rememorigos al ĉiuj ĉeestantoj la farendajn taskojn por aktivaj S. A. T-anoj. Ĝi estos ankaŭ rebrilo de la antaŭaj Kongresoj.

Amatoroj povas kontribui al la gajaj kunsidoj de la Kongreso. Se vi povas ion prezenti por niaj interfratiga kaj gaja Vesperoj, nepre anoncu vin al O. K. K.

JUNULOJ! Kunportu buŝmuzikilojn, mandolinojn, gitarojn, certe inter vi troviĝas talentuloj kiujn ni ŝatus arigi kaj aŭdigi.

LA LIMOJ FOR!

Bariloj kaj limo: nur signoj de timo!
Sen ili libero sur tuta la fero!
Por patrio... la mondon;
Por nacieco... la homaron!

HELPU O. K. K-on

Ni tute ne povas respondeci pri la mankoj kiujn povos riproĉi al ni Kamaradoj kiuj ne komplete respondis ĉiujn demandojn per nia Aligilo-Mendilo.

ĈE VIA ALVENO EN NANCIO...

O. K. K. provas aranĝi la akceptadon kiel eble plej bone por eviti al vi longan atendadon. Tial, ni pretigos antaŭ la Kongreso vian Restad-Konton. Alvenante Nancion, vi ricevos slipon kun via Konto per via Provizora Kongres-Karto. Tiam, vi mem kontrolos tiun Restad-konton kaj tuj povos ricevi la Kongres-materialon (loĝ-, manĝ-, kaj ekskursaj kuponoj) post pago al la kongresa Kaso.

POR EVITI KOMPLIKAJN TRAKTADOJN ĈE VIA ALVENO, vi eventuale avertu nin kiel eble plej frue per letero aŭ poŝtkarto se vi antaŭvidas ŝanĝojn aldonindaj al viaj mendoj por rezervigo de litoj, manĝoj, ekskursoj, ktp. Restad-konto estos kalkulita antaŭ la Kongreso konforme al la Mendilo kiun ni ricevis de vi kun aligilo, necesas do ke ĉiu mendilo respugulu tre precize viajn dezirojn.

PASIVEMO ESTU FOR
AL ĈIU UNU TASKO POR S. A. T.

FAKAJ KAJ FRAKCIAJ KUNSIDOJ:

Ĝis nun ni antaŭvidas aranĝon de pluraj fakaj kaj frakciaj kunsidoj. Kamaradoj anoncis al ni tiujn: Sennaciistoj — Pacistoj — Pedagogoj — Junuloj — Natur-amikoj — Sindikatanoj — Socialistoj — Anarkistoj — Liberpensuloj.

O. K. K. atentigas ĉiujn organizantojn de tiuj kunsidoj pri organiza grava punkto. Necesas ke respektivaj respondeculoj de Fakoj aŭ Frakcioj kontaktu O. K. K. Sekretarion antaŭ la Kongreso por interkonsento pri la dato kaj horaro de ĉiu kunveno. Ni ne povos prizorgi kunvenon ne anoncita antaŭ la 1-a de Julio pro rezervigo de kunsidoj.

En Galerioj de nia Kongresejo, funkcios dum la tuta semajno la kutimaj servoj: »Libro-Servo«, Poŝtoŝefo, Informejo kaj vi povos ripozi, skribi, legi en nia Ekspoziciejo.

DANK-ESPRIMOJ

O. K. K. esprimas sincerajn dankojn al Respondeculoj de la loka Turisma-Servo kaj speciale al la ĝenerala Sekretario, kiu malavare disponigis materialon al nia 27-a kaj aperigis faldprospekton en Esperanto pri Nancio okaze de nia Kongreso.

Al niaj Gekamaradoj el Jugoslavio kiuj prizorgis kompostadon, presadon kaj ekspedon de tiu unua numero de »Voĉo de l'Kongreso«.

EN NANCIO

LIBRO-SERVO

prezentos SAT eldonojn

Kiel memoraje al nia 27-a
VIA ĈETU LIBROJN

GEKNABA KONGRESETO

Aliĝo senpaga sed deviga por geknaboj ĝis 15 jaraĝaj (oni utiligu la SAT-Kongres-aliiĝilon).

Ĉiuj gealiĝintoj ricevos specialan bulteneton »Nia Voĉeto« antaŭ la Kongreso kun ĉiuj klarigoj pri la programo kaj restad-kondiĉoj. »Nia Voĉeto« enhavas ankaŭ plurajn artikolojn verkitaj de la geknaboj.

Loĝado kaj manĝo.

La Geknaboj loĝos kun la gepatroj sed por tiuj kiuj anoncos sin, O. K. K. povos aranĝi dormejojn aparte por knabinoj kaj knaboj, sub respondeco de instruistaj Gekamaradoj en Amasloĝejo B (100. fr. f. por nokto). Tia tranoktado estus verŝajne pli interesa por geknaboj kaj malaltfigus la elspezojn de la gepatroj; sed tiu aranĝo valoros nur se konsento de la gepatroj atingas nin antaŭ la Kongreso.

Ni ankaŭ povos rezervigi tablon por geknaboj kiuj manĝos en Kongresa Restoracio; pri tiu lasta aranĝo ne necesas anonci sin antaŭe.

PROVIZORA PROGRAMO

Dimanĉe: 9-a: malferma kunsideto de »Amikara Rondeto«;
14-a: geknaba promenado tra la urbo (gvidata);

Lunde: 9-a: Ekskurseto al najbara monteto kaj arbaro. Flor- ŝton- insekt- kolektado. Vizito al poto-farejo;
14-a: gvidata vizito al »Lorena Muzeo«.
16-a: foto-ludo per kolektitaj floroj.

Marde: 9-a: ludoj, kantoj, mimoj. Memfabbrikado de flugaparatoj.

Merkrede: 9-a: vizito al flugejo. Konkurso por flugaparatoj.
14.30: Vizito al fabriko. Prepara kunveno por festo.

Vendrede: 9-a: Vizito al gazet-presejo.
14-a: Vizito al Radio-elsendejo.
20-a: Geknaba kontribuo al Gaja vespero.

La cetera tempo estas libera. Tiam, la geknaboj partoprenos la gajajn kunsidojn aŭ ekskursojn kun la gepatroj kaj esperantistaj geonkloj.

Por ne dormemaj geknaboj, amuzaj kunsidoj okazos ĉiutage de la 20-a ĝis la 22-a vespere.

GEKNABOJ

EL

TUTMONDO!

SALUTON...

„Vi juna knabo aŭ knabino kiu ankoraŭ ne aliĝis, vi faru tion. Vin ĉiujn frate salutas“

Juno Böberg — 12 jara
ENSKEDE — Svedio

„Ĉi foje, mi la unuan fojon kongresos eksterlande. — Mi jam multe ĝojas“

Svobodan Zlatnar — 12 jara
LJUBLJANA — Jugoslavio

„Korajn salutojn kaj ĝis revido en Nancy“

Yvonne Zendijk — 8 jara
HAGO — Nederlando

„Saluton al la Geknaboj kiuj skribos por »Nia Voĉeto«

Nani Clerc — 7 jara
Francio

VI LEGU NIAN GAZETON »NIA VOĈETO«!

POSTKONGRESAJ ARANĜOJ

JUNUL FAKA RENKONTIĜO
7-a—15-a AŬGUSTO 1954

En soleca arbardomo, inter abioj kaj granitaj aŭ greizaj rokegoj kun granda tendumtereno, proksime de la ĉarma urbeto RAONON L'ETAPE (60 Km. de Nancio).

ALIĜO devas atingi la Respondecon nepre antaŭ la 1-a de Julio (200 fr. f. aŭ 6 Resp. Kuponoj) pageblaj prefere antaŭ la Kongreso; se ne eble, tuj ĉe la alveno en Nancio.



VOJAGO al RAONO: Karavanetoj al Raono, trajne kaj bicikle, estos organizataj en Nancio dum la kongres-semajno.

Restado: 500 fr. F. por persono kaj tago (3 manĝoj kaj loĝado). Nepre kunporti manĝilaron kaj dormsakon. La litoj estas ekipitaj nur per matracoj. Tendumantoj kunportu sian materialon. Ni rezervas kelkajn kovrilojn por kamaradoj el malproksimaj landoj. Slosebla garaĝo por bicikloj kaj motorcikloj. Atingebla de aŭtomobiloj.

PROVIZORA PROGRAMO: Multnombraj pied-ekskursoj. Vizitoj al paper-fabriko kaj ŝton-eltirejo. Prelegoj kaj debatoj. Amuzaj kampfajroj. Banadoj. Interesatoj kiuj volas mem pretigi manĝon ankaŭ povos, sed laŭ tre primitiva ligno-fajra tekniko. (Por tiuj, restado: 100 fr. F. tage).

Mendu aliĝilon aŭ skribu precize pri via restado (de — ĝis) al la Respondeco: K-do Klaŭdio Keinclauss, en BENAMENIL (Meurthe et Moselle).

KVINDEK GEJUNULOJ

el diversaj landoj, membroj de la internaciaj labor-grupoj venis post la lasta milito en Raono kaj kontribuis je la rekonstrua laboro de tiu grand-parte detruita urbeto.

Iniciale de la tiama urbestaro, la gejunuloj, inter kiuj troviĝis ankaŭ esperantistoj, decidis konstrui Junul-Domon sur tereno donace oferita de la Komunumo. En pitoreska loko de la abia arbaro, je distanco de unu kilometro, ili elfosis, eltiris greizajn ŝtonojn, forhakis arbojn, kaj, post unu laborjaro estis konstruitaj domegoj.

Duon-politikaj kaj duon-financaj motivoj devigis la gejunulan grupeton forvojaĝi al aliaj taskoj, dise en la mondon. Loka komitato prizorgis la konstruaĵon en kiu mankis la internaj aranĝoj. Subvencioj kaj monrimedoj iĝis pli kaj pli malgravaj kaj la verko de la internacia grupo restis duone ekipita, vizitata nur dum la bela sezono de kelkaj junul-gastejanoj aŭ Natur-amikoj.

La teretaĝo konsistas el du arandaj kvadrataj konstruaĵoj kun perono kunigitaj per larĝa, belaspekta fasado el ruĝa grejzo. Nur la orienta parto de la domo estas komplete ekipita je pordoj kaj fenestroj. De la enirejo larĝe malfermata al la lumo, oni ekvidas ŝtuparon kiu kondukas al la unua etaĝo kun

dormejoj kaj kunvenejo. Longa balkono kronas la sudan fasadon de la tuta etaĝo el ligno.

Jen, la Domo, verko de gejunuloj, viktimo de burokrataj ŝtataj instancoj, simbolo de la malfacila batalo de progresemuloj. Jen, la Rendevuejo de niaj S. A. T. Gejunuloj en 1954.

MIGRADO EN »VOGEZOJ«

En greizaj Vogejoj, proksime de la monto Donon kaj valo de Sirmek, troviĝas ankoraŭ lokoj tre malofte vizitataj. En tiu regiono, densege kreskas grandaj abioj kiuj donas misteran aspekton al la arbaro. La abioj kovras ĉion per profunda ombro, falintoj arboj restas surloke ĝis kompleta polviĝo. La ruĝ-koloraj greizaj rokegoj kiuj levigas sur la supraĵoj estas kovritaj grandparte de riĝega kreskaĵaro. Vento kaj pluvo faris tie gigantan skulptistan laboron; ĉiu rokego prezentas strangan figurojn al kiuj la montaranoj donis kuriozajn nomojn: »la dikulo«, »la fejnoj«, »la sorĉistino« ktp.

Foje, post longa marŝado, kvin junaj kunuloj atingis la rokegon de »la pendita katino« de kies supraĵo oni havas abruptan rigardon al Sirmek-valo. Inluite de tiom da sovaĝaj sed belegaj viditaĵoj, ili longe diskutis ĉe la fajro, vespere, pri natur-sciencoj, deveno kaj evoluo de la vivo.

Sekvantan matenon, iu el la trupeto malkovris hazarde, ĉe abrupta flanko de la rokego, du skulptitajn frazojn kiuj resumis la vesperan debaton: »La suno estas patro de la vivo«, »La akvo estas patrino de la vivo«.

La migrintoj junuloj neniam forgesos la skulpteman nekonatan filozofon de la »pendita katino«.

PETRO.

FERIOJ EN VOGEOJ

Por niaj Gekamaradoj kiuj ricevas pli longajn feriojn kaj deziras restadi post la kongreso en la montaro, nia Junul-faka Respondeco pretas komuniki adresojn kaj klarigojn pri Hoteletoj, Natur-Amikaj Domoj, Junul-gastejoj. Inter alie ni mencias la N. A. Domojn kiuj abundas kaj ĝenerale situas en belegaj lokoj. Interesatoj skribu kun Resp. Kupono al K-do KLEINCLAUSS, en BENAMENIL (Meurthe et Moselle). — Francio.

IOM DA HISTORIO KAJ LEGENDOJ

»STONO de la ALVOKO« — Starante sur tiu rokego, ĉe la supraĵo de la monto, ni parte malkovras RAONON kaj la du valojn de Merto kaj Rabodo. Ĉirkaŭas nin fosajoj, ŝtonamasoj, ruinoj de malnovaj fortikaĵoj. La keltaj posedis konstruaĵojn sur tiu promontoro.

Laŭ la tradicio, »stono de la alvoko«, iam en pasinteco, estis utiligata por averti la loĝantaron de la tuta regiono pri iu ajn danĝero, invadado aŭ katastrofo. Tiam oni alarmon donis per fajrego sur la supraĵo. Pli proksime de ni, okaze de Johano-festo, la vilaĝaj gejunuloj ankaŭ runde dancis kaj kantis en tiu loko; nun, nur natur-amantoj vizitas tiun lokon. Homoj ne plu alvokas el la ŝtono.

»KALDRONO DE LA FEINOJ« — En la arbaro, ĉe vojeto, spirante la bonan aĉtan ĉerpante floretojn, vi povos, tute hazarde, malkovri strangan rokon. Sur la glata supraĵo, tri truoj estas videblaj, certe borilaj de homaj manoj. Tiuj truoj estas ĉiam plenaj je akvo. Ili estis borataj dum pratempoj kaj nun ankoraŭ pensigas la vizitantojn pri iaj misteraj originoj.

Oni kredas ĝenerale ke tiu roko estis ofer-ŝtono kaj ke la truoj ricevis la sangon de la viktimoj. Alia opinio, ŝajne pli ĝusta, estas ke tiu roko kun ĝiaj truoj estas post-restaĵoj de la prahoma Akvo-kulto. Tie, antaŭ multaj jarcentoj, homoj grupiĝis kaj petis diajn helpojn; nun, la »Kaldrono de la Feinoj« farigis simpla trinkejo kaj banejo... por la vogezaĵbirdetoj.

Klaŭdio

Eldonas: Laborista Esperanto societo Zagreb, Ĉefa kaj respondeca redaktoro, Vokoun Franjo Zagreb., I. Stara Peščenica 50. Tekniko redaktoro Obad Geza Zagreb II, Svarova ul. 1. — Presejo: »Ognjen Prica«, Zagreb, Savska cesta 31, Jugoslavio.

La Voĉo de la 97-a Kongreso

Eldono okaze de la 27a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — N A N C I O — 31 Julio — 6 aŭgusto 1954



La signifo de la S.A.T. kongresoj

Unue mi respondu la demandon: Kial SAT ne kontentige progresas en Germanio? La tiurilataj kaŭzoj estas tre diversaj. Ĝenerale mankas la antaŭmilita idealismo por kulturaj problemoj. Pro la dum- kaj postmilita mizero, la salajrata popolo unue zorgas por sia vivtenado. La valutreformo en la jaro 1948 malriĉigis tiujn, kiuj havis iom da mono ŝparita. Nuntempe en la okcidenta Germanio ekzistas abundo da nutraĵoj kaj vestaĵoj; tamen restas la aktuala mizero sur la ĝoja kampo, almenaŭ por la plej multaj loĝantoj. Tial la aspiroj de la ĝenerala homaro estas nur materiaj. Kiel plua bremsilo efikas la konstanta maltrankvilo politika. La gazetaro kaj Radio prefere raportadas pri armado kaj militdangero, minacanta la atombomba problemoj estas la plej aktuala! Kaj tia stato verŝajne ekzistas en kelkaj — aŭ multaj — landoj! Tamen oro da malnovaj SAT-anoj restas fidelaj al SAT. Niaj fratoj en la Orienta Zono, okupata de la rusoj, interne certe ankaŭ restis fidelaj al ni; sed ilia registaro nur nun ne ŝatas ilian aktivecon publikan kaj organizitan. Granda manko rilate nian varbadon por Esperanto ĝenerale kaj por SAT speciale estas, ke ni absolute ne havas eblecon kontakti kun niaj gekamaradoj en Sovetio. Tio estas absurda rilate la devizon de Karl Marx: »Proletoj tutmonde unuigu vin!« — Nun pri la temo mem! Antaŭ la fondiĝo de SAT jam mi — en la kadro de »Liberiga Stelo« — havis la agrablan avantaĝon konatiĝi kun Lanti, la posta »Patro de SAT«. Okaze de SAT-kongresoj kaj per legado de S-ulo mi enprofundiĝis pli kaj pli en la pensmanieron kaj

animon de Lanti, kiu zorgeme tenis siajn manojn super »sia infano«, kiel li mem iam en letero nomis SAT. La tuta konduto de li dum kongresoj, konferencoj kaj personaj kunestoj konvinkis min, ke li estis unu el la plej perfektaj homoj: idealista, demokrata, akre pensanta kaj konsekvence aganta batalanto por la spirita emancipiĝo de la laborularo. Dum la Hitler-a reĝimo nia reciproka korespondado estis iom komplika tial, ĉar oni devis legi inter la linioj. Plej sanktaj estis por mi la ĝisnoktaj horoj, kiam ni ambaŭ sole sidadis sur benko en la London-a »Heyde-Parko«. Tie li elverŝis sian biografion al mi tiom detale, ke depost tiu tempo neniu homo estis interne pli proksima al mi lia »vostento«, absenti kaj »pajigi« homojn, mi imitas praktike kun plej bona sukceso. Estas natura fakto, ke tiuj gekamaradoj, kiuj havis okazon esti longan tempon en konstanta kontakto kun Lanti, same, aŭ eĉ pli, estas infektitaj de lia karaktero. Tio rilatas precipe al la Pariz-aj gekamaradoj kaj speciale al la Plenumkomitataro, el kiu bedaŭrinde tro frue foriĝis nia kara, sed modesta kaj fidela Glodo. Tamen ekzistas »stoko« da Lanti-ecoj influitoj, krom en Parizo, ankaŭ en aliaj sektoroj de SAT-anoj! Tial, post la morto de la »patro« de SAT, mi volonte daŭrigadas interrilaton kun liaj »infanoj« per niaj kongresoj, S-ulo, Senn. Revuo, korespondado, personaj renkontiĝoj k. t. p. La paragrafo 1-a de nia SAT-statuto estas unu el la plej noblaj statutparagrafoj, kiujn mi konas! Tial mi sentas min ligita al SAT!

De SAT-ano 61

Organizu la kolektivan korespondadon

La korespondado havas multoblan signifon. Pere de ĝi ni interŝanĝas la pensojn kun apartenantoj de aliaj landoj. Ni havas okazon informi ilin pri niaj penadoj, pri nia laboro, pri nia kulturo ktp.

Samtempe ni sciigas pri la kutimoj, historio, deziroj kaj revoj de aliaj popoloj. Tiu ĉi reciproka proksimiĝo pere de korespondado multobligas la internaciajn ligojn kaj tiamaniere helpas la interkonatiĝon kaj plifirmiĝon de la interhoma kaj interpopola amikeco. La korespondado, krome, per si mem ĝojigas. Ricevi leteron aŭ poŝtkarton el malproksima lando, legi la pensojn de nekonsanta kamarado sendube prezentas rimarkindan eventon.

Hodiaŭ la cirkonstancoj estas favoraj por tiu ĉi agado kaj ni eluzu kiom eble plej multe por ankaŭ tiamaniere diskonigi al la va-

sta mondo la streĉajn penadojn sur la ekonomia kaj kultura kampoj.

Tiucele precipe trafa estas la kolektiva korespondado. Pere de ĝi niaj laboristoj, kamparanoj, intelektuloj havas eblecon ne nur kontaktiĝi formale kun la cetera mondo, sed ankaŭ interŝanĝi la atingitajn spertojn.

Antaŭ kelkaj jaroj kelkdekoj da fabrikoj kolektive korespondadis kaj rezultoj estis tre bonaj. La sistemo de korespondado estas tre simpla. Kie ajn troviĝas unu esperantisto, li instigu siajn gekamaradojn skribi en nacia lingvo leteron al samspeca institucio (fabriko, lernejo ktp.) en dezirata lando. Tiu letero estas de la esperantisto tradukita esperanten kaj, kune kun naciolingva originalo sendita al esperantista societo.

(Daŭrigo sur 2. paĝo)

Bonvenon!

En 1939 dum la lasta kunsido de la kopenhaga S. A. T. Kongreso nia Rondeto de Nancio jam trovis la Imperilismo, socialismo kaj ŝovinismo, plian fojon, trudis nin ĉiujn en teruran interbuĉadon. Ne eblis al ni ekentrepreni la organizadon de la projektita 1940-a Renkontiĝo.

Pasis 15 jaroj, pasis la milito rabante la vivon de multaj el niaj Gekamaradoj kaj amikoj. Spite al nubegoj, daŭre minacantaj la pacon, persisteme laboradis la S.A.T.-anoj por pli humaneca mondo k pli bela socio. Levigis nova generacio de la semado antaŭa kaj, tamen, vi atingas la celon, la 27-an etapon de nia nelaciĝanta, pacema, ĉiam antaŭen iranta anaro al celo plej alta.

Bonvenon al vi kiuj povis atingi nian ĉi-jaran kunvenlokon kaj fratajn salutojn al ĉiuj malproksimaj amikoj kies nur pensoj povos flugi al ni dum tiu semajno.

Ni deziras al vi agrablan restadon en la lorena Ĉefurbo kaj frukto-donaĵn kunsidojn. Harmoniece disvolviĝu nun la programo kiun ni preparis por vi sed kies aktoroj estas vi mem. Per nia sinteno ni pruvu ke kun niaj personaj ideoj kaj konceptoj, tolereme kaj kleriĉe. »Ni laborantoj el ĉiuj landoj unuiĝis!«

Plian fojon, ni montru al la publiko ne-esperantista ke ni trovis la vojon al mond-unueco, ke nia S. A. T. estas vivanta realaĵo. Ni montru ke nia idealo estas nuntempe la sola al kiu oni povas sentime dediĉi siajn tutajn fortojn.

O. K. K.

PROGRAMO kaj INFORMOJ

gravaj sciigoj

pri la kongresa semajno

paĝoj 3—4 de tiu numero

DE »VOĈO DE L'KONGRESO«

de kiam ekzistas S. A. T. movado, Jugoslavaj ge-kdoj ne vizitis S. A. T. kongresojn. Kiaj kaŭzoj? Antaŭmilita laboristoj ne povis priŝpari aŭ kolekti la monon por havigi la dokumentojn - pasporto - vizoj ktp. Kvankam la nombro de S. A. T-anoj estis rimarkinda. Esp.-movado en antaŭmilita lando estis sufiĉe forta, ligita kun la neŭtrala Internacia Esperanto movado, iliaj anoj vizitadis la kongresojn pro sola amuzo.

Laboristoj tiam ne povis postuli ian apogon, helpon, subvencion de la sindikatoj, kult.-klerigaj asocioj — kolektivoj — entreprenoj, ĉar tiamaj sindikataj gvidantoj timis apogi esperanto - movadon. Kultur - klerigaj asocioj ankoraŭ malfortaj, kolektiva mastrumado ne ekzistis, entreprenoj — fabrikoj en la manoj de la ekspluatantoj. Nun **unuan fojon** niaj anoj de S. A. T. kaj simpatiuloj vizitis S. A. T. kongreson. **Kial?** Post maldensigo de niaj vicoj dum la mondmilito kaj posta unueca gvidado de la esperanto movado tamen ĝi plifortigis. Iu mankis al laborista esperantisto. Esperanto kiel la lingvo ne povis vivi inter la kvar muroj, ĝi devis eliri kaj serĉi sian vastan kamplaboron. Ĝi trovis la vojon. Iu devas ekmovigi, instigi kaj gvidi.

Antaŭ du jaroj la ĉaro ekmoviĝis kaj ĉirkaŭ la ero la rondo pligrandiĝis. Per la kompreno kaj abunda helpo de la Plenum Komitato de SAT, landa peranto havis pli facilan plugadon »fosi nian sulkon«. La grupo ricevis kuraĝon eklabori inter ĉiuj esperantistoj, kiuj akceptis la devizon »**Proletoj de la tuta mondo unuigu!**« per la lingvo Esperanto kiel la rimedo por la interkompreniĝo. Tiun kompreniĝon havas niaj gvidantoj en la sindikatoj, entreprenoj, kolektivoj kie regas la potenco de laborista mastrumado, kiuj subvencias siajn ge-kdojn viziti **unuan fojon** Tutmondan proletan esperanto kongreson en Nancio, Francio.

Jes, **unuan fojon** ero da gelaboristoj veturas konscie preni la taskojn pravi ke per la lingvo Esperanto interfratiĝos — priparolos kaj decidos por la pluraj jaroj, pli amase ĉeesti.

Unuan fojon, landa peranto kun sia grupo ĉeestas la kongreson — ĝian laboron — ĝian traktadon — konsilojn, dankante subvencion al la sindikatoj — kolektivoj — entreprenoj kaj Laborista kultur-kleriga komunumo.

Provu aliaj landaj perantoj samon fari, plifirmigi laboron inter la laboristaro. precipe en la kadro de la sindikato, kolektivoj kaj entreprenoj, kie estas la kerno de nia sukceso.

Unuan fojon ni Jugoslavaj ge-kdoj troviĝos inter via rondo. Akceptu nin kamarade — komprenu nin amike, ni kune ekmarŝu al nia celo — celo de pli forta SAT movado, sub la devizo: »Proletoj de la tuta mondo unuigu!« per la lingvo Esperanto!

**Landa Peranto de SAT por Jugoslavio
Josip Vajdlj**

(Fino de l' artikolo de k-do Vokoun)

Estus tre dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj grandskale eluzu la kolektivajn korespondadon. Ili atentigu pri tio siajn gekamaradojn en la laborejoj, fabrikoj kaj sindikatoj. Tamen oni ne faru direktan propagadon por Esperanto. Sufiĉas akcenti, ke pere de Esperanto oni kontaktiĝas kun la ekstera mondo, sed ke oni ricevos certan respondon. Konkrete ni agu por la reciproka interkonatiĝo de la popoloj, de laboristaro tutmonda, ni helpu la progreson kaj la fortikiĝon de la demokratio en la mondo. Unu el fortaj apogoj al tiucelaj penadoj estu la kolektiva korespondado. Dum kongresoj oni havas eblecojn interkonatiĝi kun samfakuloj kaj oni interkonsentu pri la kolektiva korespondado.

Franjo Vokoun, Zagreb

Inter la ĉefaj trajtoj de Nancio superstaras ĝia grava Universitato. Fondita en 1572, ĝi travivis multajn turmentojn antaŭ la nuna, kvazaŭ triumfa, periodo.

La Jezuitoj en Musiponto

En Loreno, ĉ. 1560, oni, eksentis la neceson de **intelektala centro** interalie por kontraŭstari la disvastiĝon de la Reformacio. Dank' al la duko Karlo la 3a kaj al la episkopo Kardinalo de Loreno, la Jezuitoj fondis universitaton en Musiponto (Mussipontum; Pont-à-Mousson), agrabla loko en la valo de la Mozelo. Ĉ. 1600, tiu universitato jam plene funkciis kun pli ol 1500 lernantoj. Ĝi konsistis el **kolegio** je ses klasoj, kaj el **kvar fakultatoj**: »artoj« (ĝenerala instruado), teologio, juro kaj medicino. Pro la teruraj batoj, kiujn suferis la regiono dum la 17a jarcento, ĝi grave regresis. Kiam Loreno oficiale fariĝis Francia provinco, ĝi estis translokata en Nacion, kie ĝi nur vegetis ĝis la Revolucio.

En Nancio tra la 19a jarcento

En 1793, la Nacia Konvencio, reorganizante, la instruadon por prepari utilajn civitanojn, abolis la universitatojn, kaj fondis »Centrajn Lernejojn« (kiuj fariĝis poste »Liceoj«), kaj, »Specialajn Lernejojn«. En Nancio estis **liceo** kaj **speciala lernejo** pri naturscienco. Nur dank' al senĉesaj klopodoj de influaj nancianoj, precipe de Barono Guerrier de Dumast, Nancio restis, post la reorganizado de 1854, ĉefurbo de unu el la dek ses definitivaj »Akademioj« (universitataj distriktoj): Akvisesto (Aix en Provence), Bezansono, Bordezo, Kano (Caen), Klermonto, Dijono, Lilio, Grenoblo, Liono, Mompeliero, Nancio, Parizo, Puatiero, Reno, Strasburgo, Tuluzo. Iom post iom, Nancio akiris siajn fakultatojn: **scienca** kaj **beletra** en 1864, medicina kaj farmacia en 1872 pro la germanigo de Sirasburgo. Komence estis nur kelkaj dekoj da studentoj, kaj mondumaj prelegoj. De ĉ. 1880 la fakultatoj povis formi liceajn profesorojn, kaj la nombro da studentoj tuj atingis 500. Per leĝo de 1896 estis fondita la »**Universitato de Nancio**«, sed jam estis komencita la brila kreskado de la 20a jarcento, kiu dissemis en la tuta urbo institutojn kaj specialajn lernejojn.

La moderna universitato

Ĉiu fakultato havas sian apartan rolon. La **jura** preparas la studentojn por juraj, administrativaj kaj ekonomiaj karieroj. Ĝi liveras la licencian (post minimumo tri jarojn da studado), kaj la doktorecon. La fakultato pri **medicino** liveras la ŝtatan diplomon de doktoro, post sep jaroj da lernado. La fakultato pri **farmacio**, kiu posedas tute novajn konstruaĵojn modele ekipitajn, liveras la diplomon de farmacisto post kvin jaroj da lernado. La **beletra** fakultato formas precipe profesorojn en unu el la sekcioj: filozofio, beletra, historio, geografio, lingvoj. La **scienca** fakultato, kiel la beletra, preparas profesorojn, per la licencio (ĝenerala lernado kaj tri »atestoj pri supera lernado«) kaj la agregacio aŭ la doktoreco. Plie, ĝi fondis ekde 1890 multajn teknikajn institutojn aŭ altlernejojn. Tio konsistigas la ĉefan trajton de la Universitato de Nancio, ĉefurbo de industria regiono. Tiu lernejojn plejparte rekrutigas la studentojn en tuta Francio, per tutnacia konkurso. Inter la plej konataj ni citu la **inĝenier-lernejojn** pri kemio, geologio, elektro kaj meĥaniko, minoj kaj metalurgio, bierfarado, ktp.

En Nancio ekzistas ankaŭ ekster universitataj lernejoj: la »Nacia Lernejo pri Akvo kaj Arbaro«, la Konservatorio, la Nacia Lernejo pri Belartoj, la Regiona Lernejo pri Arkitekturo. La studentoj havas je sia dispono la 800.000 volumojn de la Universi-

tata **Biblioteko**. Krom tio la Publika Biblioteko enhavas 400.000 volumojn. Klerigjele oni povas ankaŭ viziti diversajn **muzeojn**: la Muzeon de la Belartoj, la Historian Lorenan Muzeon, la Geologian Muzeon, ktp...

La vivo en la Universitato

Aksesore ekzistas diversaj servoj, kiuj ludas gravan rolon por la materia vivo de la studentaro. La loka sekcio de la »**Universitata Servo por Statistikoj**«, donas informojn pri la lernejoj kaj profesioj. La »**Regiona Centro por Helpado**« al la lernejo kaj universitata junularo, reprezentanto de la nacia centro, mastrumas la subvenciojn de la ministrejo destinitaj al la studenta civito kaj al la restoracioj. Dank' al la Universitata Solidar-Servo, subtenata de la ŝtato kaj de privataj batoj, ĝi helpas la studentojn, kiuj ne ricevas sufiĉan stipendion, jen de la gepatroj, jen de la ŝtato. Ĝi ankaŭ kunlaboras kun la Universitata Centro por Antaŭgarda Kuracado. Iom pli ol 400 studentoj (unu dekonon) loĝas en la **Studenta Civito**, moderna konstruaĵo datumanta de 1932. La **Ĝenerala Asocio** de la Studentoj, la plej malnova de Francio, sindikato de la studentaro, posedas trinkejon, bibliotekon, legejon kaj diversajn servojn. La **Ĝenerala Mutualo** de la Lorenaj Studentoj, filio de la nacia samcela organizo administras, kaj eventuale kompletigas, la **Socian Asekuron** por studentoj. En la vivo de la universitato estas ankaŭ **Sportaj asocioj**. Dank' al la helpo de la Socia Asekuro, malsanuloj povas vivi en la **Internacia Ĉaleto de la Studentoj en la Alpoj**.

Konkludo

Tiu skizo, bedaŭrinde tro malkompleta, pri la deveno kaj la stato de Francia Universitato, eble kontribuos al pli bona kompreno de tiu aparta medio. De-longe oni sentas en Francio la neceson de la radikala reformo de la instruado: la nuna fundamento datumas de ĉ. 1880, ĝi bezonas plian demokratigon. Tion ne devas ignori la popolon, se ĝi deziras ke la universitato liveru al nia teknika civilizo klerajn gvidantojn, anstataŭ lertajn homekspluatistojn aŭ senutilajn erudiciulojn.

A. ANDRIEU

RESUMA KANTO PRI LA PASINTJARA KONGRESO

Tre ŝatata amikaro, baldaŭ venos fin'

De la belaj festotagoj. Vi permesu nin,

Ke kantante ni resumu pri ĉi SAT-kongres';

La demandon: »Ĉu vi ĝuis?«

Vi respondu: »JES«.

Danke iras niaj pensoj al kongrespatri'n'

Ŝi kaj ŝia edzo zorgis, zorgis ĝis la fin'

Ili penis tage, nokte, sklavis kun sukces';

La demandon: »Ĉu laŭdinde?«

Vi respondu: »JES«.

Regis goja, bela sfero, ne forgesu ni,

Pri la tre, tre bela hundo, tre amuze ĝi,

Ludis pilke kun la knaboj kaj, — eĉ sen permes' —

La demandon: »Ĉu vi ŝatis?«

Vi respondu: »JES«.

Da prelegoj estis pluraj, nombris ni eĉ kvin.

Ili ĉiuj senrezerve interesis nin.

Ni asertas: Vi aŭskultus, eĉ s eestus ses!

La demandon: »Ĉu ni pravos?«

Vi respondu: »JES«.

Postan jaron ni grandare iras al Nanci';

Grandomase ni invadu l'urbon de »Luvij« (Louis).

Eble estos pli impona tie la kongres';

La demandon: »Ĉu ni iru?«

Vi respondu: »JES«.

Morgaŭ estos tre trunkvile en ĉi »Wortley Hall«,

Iros ĉiuj ni denove al la vivbatal'.

Certe ĉiam ni memoros pri ĉi l'efs, ha, ha!

Finu ni kun »GIS REVIDO«, hip, hip, hip, hura!!!!!!

Kantis FODOSO kaj MIA dum la adiaŭa vespero de la 26-a SAT-Kongreso en »WORTLEY HALL«.

KONGRESAJ INFORMOJ

Programo

Definitivan programon kun horaro por la tuta semajno vi legu en via
POŝGVIDLIBRO

TAGORDO de la Kongresaj kunsidoj

Dimanĉe, okaze de la Solana Malfermo, post la salutparoloj de l'representantoj el landaj kaj fakaj asocioj, do preskaŭ ĉe la fino de la kunveno, estas aranĝata la elekto de kongresaj funkciuloj: Prezidentaro, Protokolantaro, Proponkomisiono, Voĉdona komitato.

Unua Laborkunsido:

Enkonduka paroladeto.

Pritrakto de la Raportaro de la Plenum-Komitato (vidu junian numeron de «Sennaciulo»), inkluzive la financon kaj redakcian raportojn; kompletigo fare de k-doj Bannier kaj Bartelmes.

Komenco de la diskutado pri la Raportoj.

Dua Laborkunsido:

Sekvo de la diskuto. Konkludoj. Voĉdono pri la P. K.-raportaro.

Raporto Ĝenerala Konsilantaro.

Raporto Konflikto-Komisiono

Raporto Literatura Komitato

Raporto LEA-Komitato

Raporto Koresponda Servo, Centro

Raporto Solidar-Servo

Raporto Vojaĝ-Servo

kun voĉdonoj

Reelekto de Plenum-Komitato

Reelekto de Konflikto-Komisiono

(eventuale en tria laborkunsido)

Propono(i).

Deziresprimo pri venontjara(j) kongres-urba(j).

Gvidrezolucia de la Kongreso.

Eventualoj.

Ni atentigas ĉiujn interesatojn kiuj ne anoncis sin antaŭ la Kongreso, bonvolu nepre ĉeesti la Junul-fakan kunsidon, dimanĉe 1. VIII, je la 17a Horo en Galerioj (Nordo).

Kompreneble, aliĝintoj ankaŭ ĉeestu tiun kunsidon; tiam, ni organizos la postkongresan vojaĝon al Raono.

FAKAJ KAJ FRAKCIAJ KUNSIDOJ

(Antaŭviditaj ĝis la 30-a de Junio)

HORARO: Akurate ĉeestu en Galerioj ejo
DIMANĈE:

17-a Horo JUNUL-FAKO — nordo
18-a " INSTRUISTOJ-PEDAGOGOJ — sudo

LUNDE:

16-a " SENNACIISTOJ — nordo
17-a " GRAFIKISTOJ (IGEL) — sudo
18-a " LIBERECANOJ — nordo

MERKREDE:

16-a " SINDIKATANOJ — sudo
17-a " BELLAMY-ABUNDANOJ — nordo
18-a " NATUR-AMIKOJ (TANEF) — sudo

VENDREDE:

9-a " PACISTOJ — sudo
10-a " VEGETARANOJ — nordo
16-a (duaj kunsidoj se necese)

Post interkonsento kun O. K. K. pliaj kunsidoj povos okazi lunde, marde, merkrede, vendrede matene de la 8-a ĝis la 9-a.

INFORMEJO

Ĝi funkcias plene de la 8 h. ĝis 9 h. 30, de la 11 h. 30 ĝis 12 h., de la 18 h. 30 ĝis 19 h., kaj dum 15 minutoj antaŭ la vesperaj kunvenoj.

Informo pri la kongreso, la urbo, la vizitoj, la ekskursoj, la postkongresaj aranĝoj, la horaro de la vagonaroj, ktp.

Korespondajoj ricevitaj: estos indikataj sur speciala tabulo la nomoj de ricevontoj.

Prezentante vian kongreskarton, vi ricevos la poŝtajon.

Interkontaktigo de kongresantoj: oni petu slipon kaj zorge plenigu ĝin. Sur speciala tabulo estos notita la nomo de l'k-do, kiun vi deziras kontaktigi; li tiel pere de la Informejo ekscios pri via ĉeesto, via deziro, loko kaj horo de rendevuo.

Perditaj, trovitaj objektoj: a) perditaj — la k-do plenigu slipon al li liverotan kun nomo kaj kongresnumero, detale priskribu la objekton; b) trovitaj — tuj deponi ilin ĉe la Informejo; la trovinto lasu nomon kaj numeron sur slipo ligota al la objekto.

Fervojoj rabatiloj: Nepre stampigu ilin en la Informejo.

ATENTIGO! Ne iru al la Informejo por babili, estu konciza, faciligu la laboron de la deĵorantoj.

POSTEJO

Ĝi estas malfermata nur je anoncitaj horoj, (vidu la horaron ĉe la ĝiĉeto) por vendo de poŝtmarkoj por kolekto. Kongresantoj bonvolu amase utiligi tiun aranĝon prefere ol la enurbaj poŝtoficejoj. Dum la tuta semajno vi povos deponi viajn korespondojn en la speciala kongresa leterkesto. Nur tiuj korespondoj ricevos la specialan kongres-stampon.

EKSPOZICIEJO

En tiu kadro vi trovos tablojn kaj sidlokojn por skribi kaj ripozi. Per tiu aranĝo, O. K. K. celas rememori al vi la plenumindajn taskojn por aktivaj S. A. T.-anoj kaj esperantistoj ĝenerale.

Gazetoj estas je via dispono sur tiuj tabloj; inter tiuj ankaŭ troviĝas la lastaj numeroj de nia oficiala asocia organo „Sennaciulo“.

ANIAJ LOĜEJOJ

UNIVERSO: Universitata Civito.

En Cité Universitaire (site universiter) 2, strato Ludovic-Beauchet, estas nia Amasloĝejo -A-.

ESTONTO: Profesia lernejo.

En Ecole Professionnelle (ekol profesionel) 29 strato des jardiniers, estas nia Amasloĝejo -B-. En tiu funkcias ankaŭ amasloĝejon por Gepatroj kun infanoj.

ESPERO: Parko de Remicourt — oficiala urba tendumejo estas ankaŭ nia Tendejo. Parc de Remicourt (park de remikur).

RAPORTO DE LA KONFLIKT-KOMISIONO

Denove mi, kiel sekretariino de K. K., raportas, ke en la pasinta agad-jaro nenia konflikto atingis nian komisionon.

Sekve ni ne bezonis prezenti solvon pri iu problemo.

Esperante, ke la 27-a Kongreso bone sukcesos, mi restas kun sennaciecaj salutoj por K. K.

H. Oudenhoven-Bishoff, sekr.

PROPONO AL LA KONGRESO (aperis en novembro Sennaciulo)

En la paragrafo 5-B de la Statuto, forigi la du vortojn: »persono aŭ«.

Motivigo. La personoj aliĝantoj al SAT laŭ tiu punkto de la Statuto estas eksigendaj laŭ regularo pri aliĝo al SAT-Kongreso, voĉdonita en Torino en 1950.

P. Levi (23.111)

LABORISTA UNIVERSITATO

Ok prelegantoj anoncis sin por tiu klerigcela parto de la semajna programo. Ĉiu prelego daŭros unu horon. La temojn mem elektis la prelegantoj post interkonsento kun O. K. K.

Detalan programon de tiu aranĝo vi trovos en via poŝgvidlibro.

Ni petas ĉiujn interesatojn AKURATE KUNSIDI je fiksita horoj en salonego de nia Kongresejo.

Pluraj aliaj interesaj prelegoj okazos dum la Frakciaj aŭ Fakaj kunsidoj. Detalan programon de tiuj troviĝas ankaŭ en poŝgvidlibro.

VEGETARA KUNSIDO

Esperanto vegetaranoj intencas reeldoni ekde 1955 la revuon »Vegetarano«, kiu aperis ĉiumonate de 1914 ĝis 1937. Tion iniciatis Izraelianoj, aparte la 80 jara sekretario de Zamenhof-Fondo en Jeruzalemo, N. B. Havkin. Nun ili esploras pri la opinioj kaj sugestoj de la interesatoj el la tuta mondo.

La idealo de S. A. T. estas grand-trajto la socia plibonigo de la homaro. La vegetarismo estas unu el la plej gravaj movadoj por individua plibonigo. Ambaŭ celoj estas strikte ligitaj; ne surprizas ke iam ekzistis vegetara-fako en S. A. T. La agadkampo de vegetarismo estas tre vasta (dieta, higieno, ktp...), sed la esperanta devus aparte atenti la moralan »homaranan« flankon. Apud la fama moto »Per niaj dentoj fosas la homo sian tombon«, ni starigu la devizon:

»Moralo plifortigo de l'Homaro, aŭ ĝia pereigo«.

Certe ĉeestas la kongreson multaj vegetaranoj aŭ simpatiantoj. Dum nia aparta kunsido ni diskutos kaj interŝanĝos niajn ideojn pri la esp. veg.-movado. Ĉiu interesato alportu sian brikon al la konstruo de sennacieca Vegetarismo.

La Organizanto: A. ANDRIEU

KONGRESA BUFEDO

Tiu kontoro estas malfermata dum la tuta semajno. La utiligantoj devas mem servi sin ĉe la kontoro. La prezoj estas samaj al tiuj de la enurbaj trinkejoj, kelkaj eĉ iom favoraj.

O. K. K. havas rajton fermi la bufedon dum la kunsidoj.

KONGRESANTOJ! Rezervu vian acetopon por niaj kongresaj kontoroj, tiel vi ankaŭ helpas la kongres-organizadojn (Libro-servo — poŝtkartoj — Bufedo).

KONGRESAJ RESTORACIOJ

Pro granda nombro de aliĝintoj, ni devis organizi tiujn en du lokoj, najbaraj:

ZAMENHOF: por verdaj kuponoj — en »Foyer Civil« (foaje sivil) 16 Cours Léopold — (10 minutoj de la Kongresejo).

LANTI: por ruĝaj kuponoj — en Junul-Domo »Maison des Jeunes« (mezo' de jen).

ALIAJ RESTORACIOJ REKOMENDITAJ

Ni publikigas ĉi sube liston de Restoracioj el la centro de Nancio, proksimaj, facile atingeblaj de nia Kongresejo.

Respondeculo de O. K. K. vizitis kelkajn (*) kaj ricevis precizajn informojn pri la prezo por tagmanĝo, ĉio enkalkulita (servo, trinkaĵo, ktp.). Plej ofte oni povas ankaŭ manĝi po porcio.

Ni publikigas tiun liston nur por faciligi vian elekton sed ne respondecas en tiu aranĝo. Pliajn adresojn vi trovos ankaŭ sur la faldprospektaj, en la kongresa Dokumentaro, ni ne kontrolis ties prezojn.

	tagmanĝo
»Pied de Cochon« 37, des Maréchaux	— 265 ff+
»A la Vierge« 33, rue des Maréchaux	— 270 ff+
»du XXème Corps« Avenue du XXème Corps	— 280 ff+
»du Cheval Blanc« 33 »Avenue du XXème Corps	— 400 ff +
»de l'Univers« rue des Carmes	— 400 ff +
»de la Cigogne« rue des Ponts	— 420 ff+
»le Glacier« place Stanislas	— 500 ff+
»Taverne Mutzig« rue des Dominicains	— 560 ff+
»Palais de la Bière« rue Saint Jean	— 600 ff+
»Au Loup« 13, rue des Ponts	— 350 ff
»Liser« 21, rue de Serre	— 300 ff
»Magasins Réunis« apud Kongresejo	— 610 ff+
»Buffet de la Gare« — en Stacidomo —	— 450 ff
»Le XXè Siècle«, rue St Dizier 17	— 400 ff+

KONGRESA INFORMILO

En Galerioj de nia Kongresejo, vi trovos grandan tabulon kun anoncoj pri la last-horaj aranĝoj por VIZITOJ, FAKAJ KAJ FRAKCIAJ KUNSIDOJ, EKSKURSOJ, O. K. K. KOMUNIKOJ.

Ni konsilas al ĉiuj ĉeestantoj sin turni ofte al tiu anoncoj-tabulo ĉar ŝanĝoj povas okazi inter la pasado de tiu »Voĉo« kaj efektiviĝo de la programoj.

Geknaba kongreseto

AMIKARA - RONDETO: Partoprenantoj!


Detalan programon por la semajno vi ricevis kun via »Kongresa Poŝ-gvidlibro«.

ALVOKO de niaj Geknaboj al ĉiuj

ESPERANTISTAJ GEONKLOJ:

Dum la paŭzoj kaj liberaj momentoj, ni, Geknaboj el tutmondo atendas vin en nia Amikara Rondeto. (Galerioj de nia Kongresejo). Tie vi povos amuzigi en nia »Kermeseto«. En tiu amuza anguleto vi provu vian lertecon kaj samtempe alportu vian kontribuon en la organizado de nia semajna restado en Nancio.

AL LA GEPATROJ: La programo por la tuta semajno troviĝas en poŝgvidlibro de viaj geknaboj, vi bonvolu tralegi ĝin kaj se necese kontakti niajn Respondeculojn — Huberto kaj K-ino Clerc (Kler) por pliaj informoj.



PROGRAMO DE LA RENKONTIGO

Sabate: 7-VIII-54, Alveno, organizado, komuna lignokolekto, kampafajro.

(Ĉiutage, la tag' kaj vespermanĝoj estos komunaj)

Dimanĉo: 8-VIII-54, vizito al la urbo, ekskurso al »ŝtono de la alvoko«, banado, kampafajro kun dancoj, ludoj, kantoj kaj muziko.

Lunde: 9-VIII-54, Prelego aŭ diskuto, pied-ekskurso, banado, kampafajro.

Marde: 10-VIII-54, Tuttaga ekskurso al »Donon« monto (komuna manĝo kunportita)

Merkredo: 11-VIII-54, Vizito al paperfabriko kaj ŝtoneltirejo.

Ĵaŭde: 12-VIII-54, Tuttaga ekskurso al »Pierre percée«, vilaĝeto kaj ruinaĵoj.

Vendredo: 13-VIII-54, Ligno-kolekto, ekskursetoj nokta pied-ekskurseto.

Sabate: 14-VIII-54, Tuttaga ekskurso tra la arbaro, banado, kampafajro.

Dimanĉo: 15-VIII-54, Debato (opinioj pri la Renkontiĝo kaj ideoj por venontaj) Adiaŭoj — Disiĝo.

EKSKURSOJ

DUONTAGA: ĉe Mosel-valo - **Mardo 3-a** Akurata kuniĝo de la partoprenantoj je 13 H. ĉe forirejo — bulvarde Geoffre (2 minutoj de Kongresejo).

TUTTAGA: Al Vogezoj Elzaco — **Ĵaŭde 5-a.** Akurata kuniĝo je la 7-a H. matene ĉe forirejo, ankaŭ bulvarde Geoffre (ĵofr).

Por ambaŭ Ekskursoj, Respondeculo deĵoras en ĉiu aŭtobuso. La detalan programon bonvolu legi ĉe nia anonc-tabulo (Kongresa informilo). La partoprenantoj mem zorgos pri tagmanĝo en Kolmaro kaj vespermanĝo en Gerardmaro. Listo de rekomenditaj restoracioj estos disdonataj al la ekskursantoj.

Por ne-partoprenantoj al niaj ekskursoj, nia Kongresejo (Galerioj) restos malfermataj. La kongresa Restoracio funkcios por interesatoj kiuj antaŭe anoncos sin.

RESPONDECO

En ĉiu Amasloĝejo deĵoras RESPONDECULO, O. K. K.-ano dum la tuta kongresa semajno. Se necese, vi turnu vin al li sed NE al domaj instancoj neesperantistaj. Logantoj en amasloĝejoj, evitu eniri kaj eliri tro ofte dum la tago, vi faciligu la taskon de la oficistoj. Dum la nokto precipe estas konsilinde ke vi grupigu por reeniro.

Vi nepre observu la internan necesan disciplinon kaj sekvu la konsilojn de nia Respondeculo.

NI KANTU EN LA KONGRESO!

Ĉiu membro de SAT devas principe kunporti al la Kongreso sian Jarlibron, — ne nur pro la regularoj entenitaj en ĝi, sed ankaŭ por komun-kanti nian propran

SAT-himnon

kiu troviĝas sur la paĝoj 36—37 kun la muziknotoj! Nederlandaj SAT-anoj jam scias ĝin kanti; kial ne ankaŭ la aliaj, kial ne ni ĉiuj?

Por igi nian Himnon konata, ni ĉiuj kune kantiĝu ĝin dum niaj Kongresoj!

»Laŭ mi, ĵon la alvoko plej nobla kaj plej justa: la servo al la homoj, kun utilec' por multaj.«

(Montaigne)
(Monteĵno)

»LA VOĈO DE L' KONGRESO«

La du numeroj estis presataj en Zagreb, dank' al la afabla helpemo de k-do Obad kaj Vokoun. Tio ebligis utiliĝi parton de la tica kongresa kapitalo.

La numeroj konsistigas utilan propagandan materialon. Ĉu ne ĝojigus amikojn, kiuj ne povis veni Nancion, ricevi ĝin? Akireblaj ili estas ĉe la libro-servo. Prezo: 20 fr. por ekzemplero.

Por utile sekvi la kongresajn debatojn, ne nur sufiĉas koni la Statuton de la Asocio, oni devas ankaŭ koni ĝian historion. Ĉe la Kongresa Librejo vi trovas la verkon

HISTORIO DE SAT 1921—1952

152 paĝoj. Ilustrita. Prezo: 450 ffr.

NI MEDITU...

El ĉi jara Raporto de la Plenum Komitato kiu estas kunmetita sincere, sen ia ajn troigo kaj fanfaronado, oni povas konstati ke ĝenerale nia SAT-movado stagnas krom en du tri landoj kie estas videbla malgranda kresko. Ĉu la signo de l' morto! Ne, ni sukcesos travivi »sep malgrasajn jarojn«, ĉar ĉirkaŭ la SAT restis fidela aro da Kamaradoj spertaj, sindonemaj kiuj laboregas ke ĝi restu savita por la estonteco.

Tamen ni devas precipe dum la kongreso en Nancio preparoli la situacion kiel amasigi la movadon. Kiamaniere atingi la »feliĉajn tempojn« de semajna »Sennaciulo« kaj monata »Sennacieca Revuo«. Ni devas serioze pritrakti ĉiujn eblecojn. La milito finiĝis, faŝismo kiel politikala potenco ne premeblas pli niajn cerbojn kaj ekonomian situon (kvakam sub la cindro...). En kelkaj Europaj landoj situacio, precipe ekonomia, ne multe sed tamen pliboniĝis. En certaj landoj laboristaj partioj aŭ regas aŭ estas »apud« la regado. Do, la eblecoj ekzistas sed ni devas elekti la ĝustan vojon, emigi niajn kunulojn por la studado kaj eklabori.

Kamaradoj en Jugoslavio klopodas nun, kiam esperanto movado ne estas ĝenata, kiel en antaŭmilita Jugoslavio sed, male, ĝuas ĉiujn favorojn — krei firman bazon por SAT-movado. Tiucele ili preparas sin por la kongreso kaj esperas kontentige solvi la problemon. Kompreneble ke ni »ne forgesos, ke la esperanto movado devas ĉiam esti tutmonde prikonsiderata«.

Simila situacio estas en Svedio, Norvegio, Nederlando, Francio, Danlando, Okc. Germanio k. a. landoj, kie niaj kamaradoj povas multon fari por la SAT-movado.

G. Obad

LASTA LISTO DE ALIGANTOJ (6 a)

Aligoj ricevitaj ĝis la 30-a de Junio:

No 448, K-ino Andersson (Svedio) — 449, K-do Karlo Vesely — 450, K-ino Paveliĉ Julija — 451, K-do Alandar — 452, K-do Jekko Kalina — 453, K-do Gvozden Sređić — 454, K-do Domajno Josip (Jugoslavio) — 455, K-ino Olsson (Danio) — 456, K-do Papavoine (Nederlando) — 457, K-ino Krauss J. — 458, K-do Wagner Dieter — 459, K-ino Prinz — 460, K-do Borgässer — 461, 462, Gek-doj Bescholdt — 463, 464, Gek-doj Flachsmeyer — 465, K-do Dittmann — 466, K-do Klussmann (Germanio) — 467, K-do Lefèvre — 468, K-ino Delmaire (Francio) — 469, K-ino Britten — 470, K-do Halliday (Britio) — 471, K-do Reval (Francio) — 472, K-do Dequaire (Madagaskaro) — 473, K-do Benaiche — 474, K-ino Garcia — 475, K-do Mazet (Francio) — 476, K-ino Veer (Aŭstralio) — 477, K-ino Eriksson — 478, K-ino Andersson R. — 479, 480, Gek-doj Johanson — 481, K-do Blomberg — 482, 483, Gek-doj Lundgren — 484, K-ino Wästfelt (Svedio) — 485, K-do Stolk (Nederlando) — 486, K-ino Pascal — 487, K-do Giquel — 488, 489, 490, 491, Verdstelluloj — 492, K-ino Parthenay (Francio) — 493, K-do Toma Havana — 494, K-ino Ivčić Božena — 495, K-do Miličević — 496, K-ino Kačović — 497, K-ino Ladjević — 498, K-do Mihajlović — 499, K-do Milčić (Jugoslavio) — 500, 501, Gek-doj Pasquier — 502, K-do Ragot — 503, K-do Sicot — 504, K-do Dabiez — 505, K-ino Palussière — 506, K-do Pannier (Francio) — 507, K-ino Hollinger — 508, K-do Pichler (Aŭstrio) — 509, K-ino Zettel — 510, K-do Ophees — 511, K-do Mailand — 512, K-do Damschen (Germanio) — 513, K-do Espinosa — 514, K-do Dufour — 515, K-do Mirland — 516, K-ino Bieckert — 517, K-ino Marchal — 518, K-do Renon (Francio)

Sume, atingis O. K. K., ĝis fino de Junio: 518 aliĝoj el 21 landoj. El Francio 175, Nederlando 114, Germanio 77, Svedio 40, Jugoslavio 38, Britio 25, Belgio 15, Aŭstrio 7, Danio 5, Aŭstralio, Venezuelo, Usono, Brazilio po 3, Japanio Sarlando po 2, Italio, Norvegio, Svisio, Meksikio, Madagaskaro, Finlando po 1.

Satanoj: 358 — Gastoj 107 — Geknaboj 30 — Subtenantoj 23.

La aliĝoj kiuj atingis O. K. K.-on post la limdato (30-a de Junio) estas anoncotej per nia »Kongresa Informilo« en Galerioj de la Kongresejo.

VIZITOJ

Gvidataj vizitoj al fabrikoj kaj Muzeoj okazos LUNDE kaj MERKREDE posttagmeze. Partoprenantoj nepre akurate grupigu ĉe vestiĝo de la kongresejo ĉu je la 13-a Horo 1/2 ĉu je la 15-a 1/2 laŭ la elektita grupo. O. K. K. organizis tiun parton de la programo tiel ke ankaŭ partoprenantoj al Fakaj-Frakciaj kunsidoj povu partopreni.

Programo kaj horaro de tiuj vizitoj troviĝas en via poŝgvidlibro. Bonvolu ek de nun elekti kaj anonci vian partoprenon ĉe ĝiĉeto OKK. Por kelkaj el tiuj vizitoj la nombro de partoprenantoj estas limigita.

EN NANCIO

LIBRO-SERVO

prezentos **SAT** eldonaĵojn

Kiel memorajo al nia 27-a
VI AĈETU LIBROJN

Eldonas: Laborista Esperanto societo Zagreb, ĉefa kaj respondeca redaktoro, Vokoun Franjo Zagreb, I. Stara Peŝčenica 50. — Teknika redaktoro Obad Geza Zagreb II, Svarova ul. 1. — Presejo: »Ognjen Prica«, Zagreb, Savska cesta 31, Jugoslavio.